

Akademio Internacia de la Sciencoj

Oprof Amri Wandel

Prezidanto _____



Aŭtuna mesaĝo al AIS-anoj, septembro 2019

Estimataj membroj kaj kunlaborantoj de AIS,

En la lastaj monatoj AIS sukcese okazigis SUS36-n kadre de BET en Litovio (aldonita artikolo en La Ondo de E-o) kaj la AIS-IKU-sesion dum la UK en Finnlando (aldonita artikolo en Revuo Esperanto). IVU-13 kaj la ĝenerala AIS-sembleo okazos dum Luminesk, en Nördlingen kaj la venonta SUS37 okazos kadre de la Germana Kongreso en majo 2020 en Frankfurto ĉe Odero.

La 36-a Sanmarineca Universitata Sesio (SUS) okazis kun la 55-a Baltiaj E-Tagoj (BET) en Litovio, komence de julio. Kadre de SUS estis prezentitaj ok kursoj kaj prelegoj. En du kursoj (Raola pri Mediprotekta kemio kaj Wandel pri Spacteleskopoj) okazis ekzamenoj, kies ĉ. 30 sukcesintoj ricevis la AIS-atestojn publike dum la solena fermo de BET.

Du semajnojn poste, dum la UK en Finnlando, okazis kiel kutime la Intenacia Kongresa Universitato kaj la *IKU-AIS komuna sesio*, kiu ĉi-jare estis la 25-a (la unua AIS-IKU sesio okazis en 1995, ankaŭ en Finnlando). En du el la tri AIS-IKU-kursoj (de Nordenstorm kaj Raola) okazis ekzamenoj kies ĉ. 10 sukcesintoj ricevis AIS-atestojn dum la Scienca Forumo, gvidita de B-A Wickström.

Sub aŭspicio de AIS kaj UEA aperis la **IKU-libro**, kiu unuafoje enhavas, aldone al la IKU-prelegoj, ankaŭ tiujn de SUS. Entute 14 plenaj tekstoj kaj 10 prelego-resumoj. Kun 200 paĝoj kaj 100 ilustraĵoj, la ĉi-jara IKU-libro estas la plej enhavriĉa kaj plej profesie redaktita (eldonita de *Impeto*, Moskvo). Ĝi elĉerpiĝis dum la BET kaj la UK, sed estos baldaŭ represita kaj mendeblos ĉe UEA por 18 eŭroj. AIS-anoj povas ĝin akiri je rabatita prezo de 15 eŭroj (mendu ĉe informo@ais-sanmarino.org aŭ ĉe mi).

Jarfine okazos kadre de la *Luminesk* en Nördlingen apud Munkeno (la 2.1.2020) la **ĝenerala asembleo de AIS**, kiu elektos novan senaton. Kadre de Luminesk ankaŭ okazos la 13-a sesio de la Internacia Vintra Universitato (IVU).

Mi atendas proponojn por prelegoj en IVU kaj ankaŭ por *SUS37*, kiu okazos en majo 2020 kadre de la *GEA-kongreso* en Frankfurto ĉe Odoro, kaj por IKU-AIS en Montrealo (vidu la inviton apud la aldonita artikolo pri IKU-AIS).

En 2020 denove okazos la konkurso por la plej bonaj sciencaj verkoj. Temas pri la du-jara *Premio Pirlot*, kiu rekomencis en nova formato en 2016 kaj 2018. Ĉi foje estos disdonitaj 9 premioj en tri kategorioj: libro, artikolo, kaj prelego. La sumo de premioj estas ĉ. 500 eŭroj. Proponoj de taŭgaj verkoj aperintaj en la du lastaj jaroj bonvenas ĉe informo@ais-sanmarino.org ĝis la fino de aprilo 2020.

Fine, ĉar AIS ne plu petas la jarkotizon (0.1 AKU aŭ 6,50 eŭroj), gravas via libervola subteno. Donackvitancojn laŭ la germana impostleĝo eblas peti al trezoristo@ais-sanmarino.org. Eblas pagi per la UEA-konto de AIS (aisc-j), la Paypal-konto de AIS, kreditkartoj aŭ la AIS-hejmpaĝo <http://www.ais-sanmarino.org/>.

Amike,

Amri